

Ekspozicio pri Edmond Privat en la Biblioteko de la Urbo Neuchâtel
okaze de la dekjara datreveno de lia morto, 3-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 477, 1972.11.29 & 12.02

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La du pasintajn elsendojn ni dediĉis al la ekspozicio, kiun starigis la Universitato kaj la Biblioteko de la Urbo Neuchâtel al la dekjara datreveno de la morto de Edmond Privat. Trian kaj lastan elsendon ni dediĉas al tiu interesa ekspozicio.

A.- Montro-fenestro montras interesan manuskripton. Temas pri plano de parolado, sur kiu Edmond Privat bone resumis sian agad-programon. Aŭskultu ĝin :

Cl.- « *Milito kontraŭ la antaŭjuĝoj kaj kontraŭ la jam faritaj ideoj. Malfidi la gazetaron. Malfermi la rigardon al la faktoj. Ekzemploj.*

A.- *Sociaj problemoj solvotaj de internacia organizaĵo. Neceso de la paco. Ligo de Nacioj. Malarmado. Spirito internacie homa.*

Cl.- *Interne de nia lando milito kontraŭ perforto ambaŭflanke. Neceso de la virina voĉdonrajto. Neevitebla alveno de la laborista kontrolo en la industrioj. Progresanta demokratio. Anstataŭigi la blindan kontraŭstaron al la novaĵoj fare de malfermita studo pri la estontecaj perspektivoj. Memtrompemo de la regantaj klasoj.*

A.- *Nova edukado direktita kontraŭ la gajn-celado. Kutimiĝo al kooperado. Ekzemplo de la kvakeroj. Helpema sinteno. Grandeco de nia epoko kaj prirespondeco de la juna generacio. »*

Cl.- Tiu plano de parolado datiĝas de la jaroj 1930-aj. Vi povas konstati, ke ĝi restis grandparte aktuala kaj eĉ revolucia. Jen pruvo pri la larĝhorizonta mondpercepto de Edmond Privat.

A.- Kiel vi rimarkis, la virina voĉdonrajto estis unu el la batalceloj de Edmond Privat. Montro-fenestro ekspozicias dokumentojn, kiujn Edmond Privat rikoltis dum la diversaj politikaj kampanjoj, kiuj fine alkondukis al la venko de la principo de egaleco inter virinoj kaj viroj. Inter tiuj dokumentoj troviĝas propagandiloj de la kontraŭuloj de la virina voĉdonrajto. Estas interese legi kelkajn sloganojn el la jaro 1941. Aŭdu :

Cl.- « *Starigi edzinon kontraŭ la edzo, jen la plej bela glor-titolo de la feminismo.*

A.- *Ĉu estas viro, kiu imagis la feminismon, aŭ virino ? Nek unu, nek alia, estas maljuna fraŭlino !*

Cl.- *Feminismo, tio estas la diktaturo de la maljunaj fraŭlinoj. Kaj ankoraŭ de kiaj maljunaj fraŭlinoj !*

A.- *Politiko eniras, kiam amo eliras.*

Cl.- *Nenio estas pli plorinda, ol malsukcesa vivo. Por virino, malsukcesa vivo, tio ne estas vivo sen voĉdon-rajto, sed vivo sen amo.*

A.- *Vera virino ĉiam preferos teni en la brakoj infanon, ol en la mano voĉdonilon.*

Cl.- *Virina registaro povas esti nur registaro kun uloj sen amo.*

A.- *Virino, kiu voĉdonas, tio estas ne malpli ridinda, ol viro, kiu naskus.*

Cl.- *Se la virinoj voĉdonos same kiel la viroj, tio estos vana.
Se ili voĉdonos pli malbone, tio estos danĝera.
Se ili voĉdonos pli bone, tiam la viroj nur devos forlasi al ili la politikon. »*

A.- *Alia propagandilo estis ankoraŭ pli konvinkiga. Al la ĝenevanoj ĝi sciigis tion :
« Estus kiom da voĉdonantinoj : 56'000.
Estus kiom da voĉdonantoj : 45'000.
La virinoj havus la plimulton.
Tio signifus politikan kaj balotan renversiĝon.
Voĉdonu NE. »*

Cl.- *Kaj la ĝenevanoj voĉdonis NE ! Edmond Privat sciis, ke militi kontraŭ anstaŭjuĝoj estas malfacile. Kiel li diris, tiu lukto estas edukiĝo al pacienco kaj bona humoro.*

A.- *Bonan humoron ankaŭ havis sinjoro Pierre Hirsch, la arkivisto de la Fondaĵo Edmond Privat, kiam li muntis tiun ekspozicion. En montrofenestro najbaras alvoko de la granda milit-rezistanto Pierre Ceresole kun la letero de la tiam svisa generalo Henri Guisan. Jen kion diskonigis tiu alvoko de Pierre Ceresole :*

Cl.- *« En junio 1940 la supera estraro de la armeo por la gazetara kaj radia servoj donis al la svisaj gazetoj la ĉi sekvan gvidlinion : « La artikoloj kaj komentarioj, kiuj akcentas la teruraĵojn de la milito por reliefigi ĝian karakteron nehoman, kontraŭkristanan kaj kontraŭsocian, estas malpermesataj. Ne publikigendaj. » Pierre Ceresole aldonis : « Eĉ dum milit-tempo oni daŭre devas instrui, ke 2 plus 2 egalas 4. Estas ankoraŭ pli grave protekti tiun fundamentan veron, ke la teruraĵoj de la milito estas nehomaj, kontraŭsociaj kaj super ĉio kontraŭkristanaj. Ĉiu orientiĝu laŭ la realaj ordonoj de sia konscienco. » Edmond Privat tiam kuraĝe apogis la fondinton de la Internacia Civila Helpservo.*

A.- *Vi aŭdis prelegon el Svislando.*

Cl.- *Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !*